

P A C O kaj J U S T I C O

Monata revuo de la grupo B r u g g e.

Sekcio de Flandra
Ligo Esperantista.

Prezidanto : Drs F. Roose-J.&M. Sabbestr. 12, Brugge-Tel. 31981
Sekretariejo : Iserentant R., Steenweg op Blankenberge, 86, Brugge.
Interŝanĝo : Maertens Grég., Nieuwstraat, 54, Assebroek
Poŝtkonto : 291429 - Maertens Grég., Assebroek

LA "LIBERVOLA CIVILA HELPSERVO INTERNACIA".

Hodiaŭ ni konigas al nia legantaro organizon kiu ne ankoraŭ estas sufiĉe konata kvankam ĝi ekestis jam kelkajn jarojn antaŭ la milito. La kaŭzo de tiu nekonateco estas la manko de rimedoj por fari grandskalan propagandon; ĝi ja ne estas komerca aŭ politika entrepreno, sed nur idealista. Efektive, ĝi havas ĉiujn ecojn por allogi la idealistojn; ĝi ja en la plej alta grado metas la proksimumon en la praktiko. Kaj ĝi faras tion sur internacia tereno. Se ĝi povus varbi tre multajn adeptojn, ĝi certe forigus malamikecojn inter la nacioj. Oni ja ne restas nesentema je libervola granda servo kiun iu alia fremda persono faras. En kio do ĝi konsistas ?

Nu, se ie granda katastrofo trafas iun komunumon, tiel ke la tieaj homoj bezonas tujan helpon, la "L.C.H.I." aperas kaj helpas. En la bela prospekto kiun oni povas ricevi de Fino Mariette Van Dyck, Jourdanstraat, 36, Brussel, ni vidas fotografiaĵojn de laborantaĵ grupoj de la "L.C.H.I.". Ili faras pezan laboron. Oni bezonas sanon kaj ferton. Kaj povas okazi ke la laboro farenata atendas ilin... tre malproksime. Ekzemple en 1933, ili devis labori en Hindujo (!) kie tertremo okazigis grandegan mizeron. La aliĝantoj faras tion tute senpage. Ili ricevas koston de vojaĝo, nutraĵon kaj ĉion necesan por la laboro. La asocio ne havas iun religion aŭ politikan doktrinaron. Nur ĝi klopodas por akiri de la registaroj ke la personoj, kiuj ne volas fari militservon pro konscienc-motivoj, povu fari civilan servon kiu estas egalvalora al la milita servo.

La iniciatoro de tiu interesa kaj belega afero estas la svisa inĝeniero Pierre Cérésole. Notu bone ke tiu-ĉi organizo ne estas esperantista movado. Sed ĝi tute harmonias kun la esperantismo kaj uzas nian lingvon. Cetere multaj de la kunlaborantoj estas samideanoj.

La emblemo estas ŝpato kun la vorto "PAX" kiu kovras rompitan glavon kaj sagon. Ĉirkaŭe estas la devizo : "NE NUR VORTOJ, SED AGOJ".

Tiu servo jam helpis en Lichterstein, Svisujo, Britujo, Francujo, Hindujo... El 35 diversaj landoj venis helpantoj al tiu laboro. Kia belega internacia familio tio estis ! Ankaŭ fraŭlinoj kaj sinjorinoj kunlaboras ĉar manĝaĵo devas esti preparata kaj vestaĵoj devas esti flikataj kaj riparataj. Tiuj kiuj partoprenis iam, ricevis edukon kiun ili neniam perdos. Ili ja konscias ke ili iam faris grandegan servon, tute sen kalkulo pri iu ajn rekompenco, faritan en multe da peno, sed nur la partoprenintoj scias kiom tio riĉigas kaj feliĉigas la homon. Jen estas la bona kaj la bela flanko en la vivo.

Tiun-ĉi jaron la L.C.H.I. laboros en Boussu-Bois dum la Paskaj tagoj kaj dum la somero. Tiu komunumo ne kapablas rekonstruigi sian lernejon kiu estis detruiita pro la bombardadoj en 1941. La L.C.H.I. plie intencas tie konstrui grandan ludejon por la tieaj geknaboj.

Kara leganto, diskonigu plej eble la "L.C.H.I.", subtenu ĝin... kaj se la cirkonstancoj diversaj tion permesas al vi, kunlaboru.

HET INTERESSANT ESPERANTO WERK IN HONGARIJE.

Wij hadden reeds de gelegenheid te wijzen op de belangrijke vorderingen die het E° maskt in centraal Europa in 't algemeen, in Oostenrijk en Tchechoslovakije in 't bijzonder. Nu moeten we even verwijlen bij Hongarije, dat voor de twee voornoemde landen niet moet onderdoen

In de handelsscholen is E° van nu voortaan een facultatief vak op het programma. Echter in 4 middelbare scholen te Budapest zelf begon het onderwijs in E°, dit op ministerieel bevel.

Op 27 November 1946 werd de E° groep gesticht van de grootste politieke partij, in dat land, nml. de agrarische partij. Staatssekretaris, Dro Franciska Vasady - Kovacs was daarop reeds aanwezig. Groepsleider is de volksvertegenwoordiger F. Csurgai.

Bij de universiteit SZEGED werd in de filologische en filozofische faculteit een lectoraat over E° ingesteld.

Als ondernemingen sloten bij de "Internationale Esperanto Ligo" aan, een der grootste banken in Hongarije, de "Hongaarse Algemeene Kredietbank", van Budapest; ook de Toeristische Dienst, het stedelijk comité voor gezondheidsbaden en de nationale bibliotheekcentrale.

In het Hongaarse parlement wordt sinds meer dan een jaar systematisch en aanhoudend gewerkt. In de hall van de afgevaardigden wordt constant een kleine E° tentoonstelling gehouden en in nog een twaalftal plaatsen worden affiches en mededelingen opgehangen. Ook worden er aanhoudend kleine cursussen en onderwijsuurtjes ingericht. Van de 20 stenografisten aan het parlement verbonden, zijn er reeds 12 Esperantist geworden. De afgevaardigden tonen dan ook veel belangstelling voor de zaak. Twee onder hen spraken vloeiend E°, de kommunist Emerik Tombacz en Stefan Csurgai van de agrarische partij.


Anderen leren nu onze taal. De twee onder-voorzitters van de kamer, Mevr. Anna Kethly en Stefan Kassa mogen als "samideanoj" aanzien worden.

Zeer belangrijk : deze bedienden en parlementairen zelf zouden zeer graag met buitenlandse collega's corresponderen over parlementaire en politieke tema's.


Ook weet gij reeds, lezer Esperantist, dat het zeer belangrijk letterkundig tijdschrift "Literatura Mondo" terug te Budapest verschijnt.

Ik kan U niet genoeg op het hart drukken dit nieuws te verspreiden en kenbaar te maken. Want men denkt hier nog te veel dat E° enkel een nietsnuttig liefhebberijtje is. En omdat onze instanties er niets voor doen, denkt men dat E° nergens de aandacht opwekt van invloedrijke kringen. Het tegendeel is waar, U ziet het ! En wat meer is, uit deze kringen en uit deze scholen zullen de mannen komen die eens in een internationaal, gezaghebbend lichaam, het E° zullen doen aannemen !

ESPERANTO VENKOS!




In het Oostenrijks staatsblad van 28 Augustus 1946 verscheen een ministerieel besluit, waarbij een staatsexamencommissie voor E° opgericht wordt; en een ander waarbij het E° als vrij leervak in alle middelbare hoofdscholen opgenomen wordt !



EL LA PROVERBARO DE ZAMENHOF :


Kiu multe minacas, ne estas dangera. Kiu multe parolas, ne multe faras. Ne timu hundon bojantan, timu hundon silentan. Ne vio batas, kio tontras. Ne ĉiu hundo bojanta estas hundo mordanta. Bojas hundo sen puno eĉ kontraŭ la suno. Hundo bojas la vojon, vento portas la bojon. Hundo bojas, homo vojnas. Sen povo kolero estas ridinda afero. Kiu minacas, tiu avertas. Koko krias fiore, sed ne dangere. Li minacas per fingro en la poŝo. Minacoj ne mortigas. Minacas dento al la vento. Kolero montras malsagulon.



ANGULO DE LA SERĈEMULOJ

=====

La piedpilkonigmo.



CENTRIFUGE :

1. Plenda ekkrio (R) - 2. Prepozicio - 3. Deziri (R) - 4. Surpriziĝi (R) - 5. Prepozicio - 6. Konjunkcio - 7. Malnova pafilo - 8. Prilabori tekseblan planton en likvaĵo (R) - 9. Fabela estaĵo (R) - 10. Montara remaĉbesto (R) - 11. Prepozicio - 12. Artikolo - 13. Granda serpento (R) - 14. Esplora dissekco de kadavro (R) - 15. Konjunkcio - 16. En alta grado - 17. Plialtigi (R) - 18. Ŝtonspeco natura - 19. Malkonfesi (R) - 20. Granda birdo (R) - 21. Literenigmo (R) - 22. Persona pronomo - 23. Mesvesto (R) - 24. Purigilo (R) - 25. Sola - 26. Persona pronomo - 27. Abstrakta koncepto (R) - 28. Speco de pafarko (R) - 29. Prepozicio - 30. Prepozicio - 31. Pezilo (R) - 32. Montrante multajn enmarajn danĝerajn rokojn (de marbordo) - 33. Adverbo - 34. Tempokalkulo (R) - 35. Muskolo apartigante la bruston de la ventro (R) - 36. Prepozicio - 37. Ŝipinstrumento (R) - 38. Amfibio (R) - 39. Loko por prezenti ludojn (R) - 40. Konjunkcio - 41. Poseda pronomo - 42. Subita nevola streĉo de muskoloj (R).

CENTRIPETA :

43. Nomo de riverego (R) - 44. Sovaga besto (R) - 45. Malsano kaŭzante malfacilan spiradon (R) - 46. Elĉerpi (R) - 47. Marŝi - 48. Flanko de konstruaĵo (R) - 49. Birdo longkrura (R) - 50. Korpoparto (R) - 51. Lirika poemo (R) - 52. Prefikso - 53. Multfoje (R) - 54. Subtera ejo (R) - 55. Parteto (R) - 56. Prepozicio - 57. Havenurbo en Finnlando - 58. Ilaro de malnovaj ŝipoj (R) - 59. Sufikso - 60. Konjunkcio - 61. Planedo (R) - 62. Fandfari (R) - 63. Moviĝo de loko al loko - 64. Membro (R) - 65. Subite fari (R) - 66. Rŝspektplena al Dio - 67. Kanibalo (R) - 68. Prefikso - 69. Tropika grimpanta vegetaĵo (R) - 70. Speco de koloro (R) - 71. Moviĝi seninterrompe (R) - 72. Persona pronomo - 73. Eligi helan lumon (R) - 74. Ne kontraŭstari (R) - 75. Daŭre - 76. Infano (R) - 77. ŝefe (R) - 78. spirebla gaso (R) - 79. Nombro - 80. Ludkarto (R) - 81. ĉio ajn

konkreta aŭ abstrakta (R) - 82. Nea konjunkcio - 83. Speco de papago (R) - 84. Birdproduktaĵo (R) - 85. Akrevida (de rigardo) - 86. Familiano (R) - 87. ĝenerala vivmaniero kaj kutima konduto de popolo (R) - 88. Speco de poemo (R) - 89. Parto de la kruro (R) - 90. Perua remaĉulo (R)

NOTOJ :

Pro lokmanko en nia revuo ni ne publikigos la solvojn de la enigmoj. Ni ĉiam metos la gajnotajn puentojn super la enigmoj kaj regule aperigos klasifikadon de la gepartoprenintoj; ĉiuj demandoj kaj solvoj pri tiu rubriko oni sendu al ISERENTANT R., Steenweg op Blankenberge, 86, Brugge.

Ni kun ĝojo konstatas ke multaj gemembroj partoprenis jam al la konkurso el la januara numero.

FINKLASIFIKADO DE LA PASINTA JARO :

1. Spruytte : 55 p. - (eĉkalkulita 20 p. por 4 ensenditaj enigmoj kiujn ni aperigos kiam li bonvole sciigos al ni la difinojn por unu krucvortenigmo kaj la trovotajn vortojn por la alia krucvortenigmo) - 2. R. Iserentant : 30 p. (kiel prizorganto de ĉi tiu rubriko ekde la komenco de la jaro li ne plu partoprenos estontece) 3. M.Th. Roose : 26 p. - 4. Gr.Maertens : 20 p. - G. Mallet : 12 p. - 6. R. De Schepper : 17 p. - 7. Et. De Baets : 14 p. - 8. M.L.Senaeve : 5 p. - kaj 6' R. Lauwers : 15 p.
La propagandoservo prizorgos la forsendadon de la premioj.

ATENTU : por la solvado de la piedpilkenigmo 15 puentojn oni povas gajni t.e. 1/6 de puento po bona vorto. Estas 90 vortoj serĉotaj. Do ĉiuj kapablos akiri kelkajn puentojn.

DIVENAĴO (ensendita de nia 3-ano Spruytte)

- Komercento el Bruselo diris al sia servistino : "Mi veturas al Bruĝo ĉe la maro kaj tie mi restados du monatojn. Sendu ĉiutage la leterojn kiujn vi ricevis de miaj klientoj al mia nova adreso".
- Unu tagon post la foriro de la komercanto, skribis la servistino al Bruĝo :
- "Sinjoro, la leterkesto estas ŝlosita. Mi ne scias kie estas la ŝlosilo. Bonvolu komuniki al mi kie ĝi estas".
- La komercanto ricevis la leteron kaj skribis al la servistino ke la ŝlosilo kuŝas en la oficejo sur la skribotablo.
- Kelkajn tagojn pli malfrue koleriĝis la komercanto. Li ricevis eĉ ne unu leteron de la servistino.
- Ĉu vi povas diveni la kialon, pro kio la komercanto ne ricevis la korespondaĵon de sia klientaro ?

Korespondado pri la rubriko ĉi-supre oni sendu al R.Iserentant, Steenweg op Blankenberge, 86, Brugge.

INVITO AL SVEDA JUNULARKUNVENO !

Dum la tempo 12 - 15 de julio 1947a (tuj post la internacia somerkurso en Skövde), okazos junularkunveno esperantista en JURSLA apud la urbo NORRKOPING en la mirinde bela regiono de Kolmården. Bonegaj ban-kaj sporteblecoj !

La partoprenontoj loĝos en bonega "esperantista somerhejmo" kaj oni aranĝos malmultekostan manĝaĵon. Bona tendkampo troviĝas por tendemuloj.

La programo ankoraŭ ne estas tute preta, sed ni promesas, ke ĝi estos enhavriĉa kaj povos doni al la partoprenontoj abunde da "korpa kaj spirita nutraĵo".

Do ni invitas eksterlandajn gejunulojn al nia kunveno kaj promesas helpi al ĉiu, kiu deziras veni al nia lando ĉi-somere.

B. v. peti informojn kaj aliĝilojn ĉe :

Src Karl E. Andersson, Jursla, 5, A B Y.

Kompreneble troviĝas multaj malfacilaĵoj rilate eksterlandajn vojaĝojn, sed ni faros nian eblon helpi al vi.

Do, bonvenon al Svedlando - al la bela sveda somero 1947 !

Sveda Esperanto-Federacio -Junulara Sekcio
Tutmonda Junular-Organizo-Sveda Sekcio.

De regel van sia. (vervolg)

- 7e vb. : "Zijn handen zijn vuil". Hoe te vertalen ? Natuurlijk "liaj manoj estas malpuraj". De regel is niet van toepassing want "zijn" staat met het onderwerp. "Haar haren zijn in wanorde = ŝiaj haroj estas en malordo".
- 8e vb. : "De jongen liep en in zijn val brak hij zijn been". Er zijn twee zinnen met elk een onderwerp : de jongen liep / en hij brak zijn been in zijn val. De tweede zin heeft daarbij twee voorwerpen : een rechtstreeksch en een onrechtstreeksch, behorende aan het onderwerp. Dus de regel van "sia" is toe te passen.
- 9e vb. : "Het meisje loopt snel en haar wangen zijn nu rood". De wangen behoren weliswaar aan het meisje doch staat niet in dezelfde zin. Inderdaad "wangen" is onderwerp van de tweede zin (dat meisje loopt snel / en haar wangen zijn nu rood). Regel van "sia" niet toepasselijk.
- 10e vb. : "Moeder legt de kam terug op zijn plaats". Er is maar één zin. Moest ge zetten "sia loko" dan zou dat de plaats van het onderwerp zijn en niet het rechtstreeksch voorwerp. Daarom moet ge vertalen : "la patrino remetis / la kombilon / en ŝia loko".
- 11e vb. : "Hij ging naar zijn kantoor en ontmoette zijn chef." Twee zinnen. Schijnbaar heeft de tweede zin geen onderwerp. Doch het onderwerp is onderverstaan (=hij) alhoewel verzwegen. Regel van "sia" toepasselijk.
- 12e vb. : "Karel liet hem zijn broer niet slaan". Wat beteekent die zin eigenlijk ? en hoe moet men ze vertalen ? Men moet die "hem" beschouwen als rechtstreeksch voorwerp van "liet" en als onderwerp van de 2e zin waarin "slaan" voorkomt. Welnu als men dan schrijft "Karlo ne lasis lin bati sian fraton" dan is het de broer van "li". Als men schrijft "Karlo ne lasis lin bati lian fraton" dan is het de broer van Karlo.
- 13e vb. : "Hij zag zijn broer spelend met zijn bal." Zoals wij hooger in voorbeeld 6 een verzwegen onderwerp hadden vóór een werkwoord in den noemvorm, zoo hebben we nu een verzwegen onderwerp vóór een werkwoord in het deelwoord-of participiumvorm. Dus als de bal eigendom is van de broer, dan : "li vidis sian fraton ludantan per sia pilko". Behoort de bal daarentegen aan het onderwerp der eerste zin (=hij) dan : "li vidis sian fraton ludantan per lia pilko".

BERMERKING :


De uiteenzetting over de refleksiiva pronomo van Dr Walter Lippman (Paul Fruictier "Kompleta gramatiko kaj Vortfarado en Esperanto" uitg. Esperantista Voĉo Jaslo Polen blz.173) is zeer interessant doch voor diegenen die geen grammaticale studie gewoon zijn, wel een beetje ingewikkeld. Ook vinden wij het onwenschelijk dat een verzwegen onderwerp zou aangenomen worden vóór een deelwoord in den passieven vorm (zoals in ons laatste voorbeeld noodzakelijker wijze een verzwegen onderwerp aangenomen werd vóór een deelwoord in den aktieven vorm). Hij steunt daarvoor o.a. op deze zin (Esperanto April 1825) : "Li ne komprenas la Francan lingvon parolatan de liaj lernantoj". Volgens onze formulering van de regel (en als men lingvo niet beschouwt als onderwerp van de 2e zin : lingvo kiu estas parolata de...) zou hier moeten staan "de siaj lernantoj" als het de lernantoj zijn van "li". Men kan dan schrijven "de liaj lernantoj" als het de lernantoj zijn van een ander. Evenwel als men een verzwegen onderwerp aannemt vóór het passieve deelwoord en dus in alle geval "de liaj lernantoj" wil schrijven omdat "de siaj lernantoj" grammaticaal beduidt dat lernantoj behoort aan "lingvo" (hetgeen een logische nonsens is) dan weet men niet meer wat te doen als de lernantoj niet van "li" doch van een ander zijn. We staan dan voor een onoplosbaar geval zoals in voorbeeld 5. Daarom gelooven wij dat onze formulering van de "sia" regel de beste en eenvoudigste is.

GESAMIDTANOJ : Por riparado de viaj ŝuoj, nur unu adresó :
 HUBERT VAN ROOSEBEKE - Calvariebergstraat, 8,
 Brugge - 5 % da rabato !

Riĉigas ne enspezo, sed prudenta elspezo. (el la proverbo-
 Kiu groŝon ne respektas, riĉecon ne kolektas. (aro de Zamenhof)

Kiam ni eliras por promenado ni ĝie povas vidi la "Klein hoefblad" (TUSSILAGO FARFARA). Tiuj kiuj jam ion scias pri botaniko vidas ke ĝi estas de la granda familio de la "Composieten". Tio kion ni nomas floro estas ĝuste dirite aro de kelkaj centoj da floretoj kiuj staras sur unu bazo. Meztranco montriĝas ke ĝi ekzistas el du specoj da floretoj :

- a) la tubformaj floroj (buisbloemen) kiuj formas diskon (la koro de la floro) kaj
- b) la rubandformaj floroj kiuj formas kronon ĉirkaŭ la disko.



La koloro de ambaŭ florspecoj estas flava. Rimarkinde estas ke oni ne povas trovi foliojn, sed nur brunverdajn skvamitajn flortrunketojn. La alto estas ĉirkaŭ 10 cm. kaj restas dum la tuta floradperiodo (+ 7 tagoj). Post tiu periodo la floro fermiĝas kaj nun maturiĝas la fruktetoj dum 1 semajno. Tiam ekkreskas la trunketo (jam estas Aprilo), duoble longiĝas kaj la verdaj folioj venas super terc. La fruktaro malfermiĝas kaj montras la tre bone konatajn ombrelojn kiuj

estas forportataj per la vento al malproksima loko kie ili denove faros "Hoefblad" kolonion.

Iomete pli malproksima ekfloras la "Vroegeling" (lit. traduke "la frua" - DRABA VERNA) kun etaj floretoj blankaj.




Vroegeling

-Kiam ni nun bone rigardas pere de lenso, ni vidas kvar korolfoliojn (kroonbladeren) en formo de kruco. Tio diras al ni ke tiu floreto apartenas al la poligalacoj (kruisbloemigen).

-La floro nomiĝas en Germanujo : "Hungerblümchen" (floro de la malsato), ĉar ĝi kreskas sur la plej malfekundaj terenoj.

-Nun ni alvenas al fosflanko. Tiu montras la belegajn florojn kun ok orflavaj korolfolioj, subtenataj de 3 malpli grandaj kalikfolioj (kelkbladeren). La planto posedas brilantajn, renoformajn foliojn; ĝi estas fikario (FICARIA VERNA). La nomo "speenkruid" venas de niaj pragepatroj kiuj pensis ke tiu planto estis medikamento por la tiel nomata hemoroido. Niaj pragepatroj ja pensis ke la formo de la planto indikis la malsanon kiun ili povis sanigi. Kiam ni fosas ĉirkaŭ la planteto, ni trovas longformajn palflavajn tuberetojn kiuj similas al mampinto. Do de tie venas la popolkredo pro la formo de tiuj tuberetoj. Nuntempe ni scias ke tiuj tuberetoj estas provizejo de nutraĵo, kiu formiĝis la antaŭan someron kaj ĝi estas tial ke la planto jam tiel frue povas floradi. Post la florado aperas en la akseloj de la folioj ankaŭ tiaj tuberetoj. Poste, ili terenfalas kaj ili estigas novajn plantojn.

Sed eble unu de la plej interesaj printempaj floroj estas la primolo (sleutelbloem - PRIMULA VERIS). La flavaj koloroj staras supre longaj, nudaj trunketoj; ĉiu floreto posedas 5 stamenojn (meeldraden) sed tio estas remarkinda ĉar ĉe tia planto ili komenciĝas ĉe la duonalto de la koroltubo (1) kaj ĉe alia planto, ili komenciĝis sur la korolo mem (2).



-Alrigardu nun la Pistilon (stamper). Sur la OVARIO (vruchtbeginsel) leviĝas la stiluso (stijl) kiu estas longa ĉe la floroj de la unua speco, sed mallonga ĉe la floroj de la dua speco, ambaŭ finiĝas per butonforma stigmato (stempel). Kiam nun alvenas insekto, altirata de la odoro kaj koloro, sur planto de la dua speco, ĝi penetras en la kolortubo, kaj puŝas sian lapon kontraŭ la stamenoj, kaj kunportas forflugante polenon (stuijmeel).

Kiam tia insekto nun vizitas floron de la dua speco, ĝi puŝas la polenon kontraŭ la butonforma stigmato. Do la poleno de mallongstilusa floro venas sur la stigmato de longstilusa floro. Kontraŭe, kiam la insekto vizitas unue longstilusa florojn,

